


LA DEKSERA



Bulletin Mensuel Espérantiste
servi gratuitement aux membres de la Section du XVII^e Arr^t
du Groupe Espérantiste de Paris.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : 1 franc par an. — Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

Groupe Espérantiste de Paris - Section du XVII^e Arrondissement

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Notre Diner mensuel.

Les prochains Diners mensuels de la Section auront lieu
par exception les Mercredis 13 Mars et 3 Avril 1912, à
8 h. précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.

Prix : fr. 3,25 (boisson et pourboire compris).

Prochaines causeries.

- 6 Mars. — Lecture littéraire suivi de jeux espérantistes.
- 13 Mars. — S-ro Pol Varton : Esperanto kaj gazetoj.
- 20 Mars. — S-ro H. van Etten : Nederlando (lumbildoj),
- 27 Mars. — S-ro Robert Bollack, subdelegito de U. E. A. :
Paroladeto propaganda por U. E. A.
- 3 Avril. — Diner mensuel suivi de jeux espérantistes.

Le Secrétaire : **ROBERT BOLLACK.**

LA MONATO ESPERANTISTA

Ni komencu tiun ĉi monaton, parolante pri la alilandaj okazintaĵoj. Inter ili ni estas informataj pri du malgajaj sciigoj.

Morto la terura forrabis de ni du bravajn samideanojn : **D-ro G. Robin**, el Bucuresti, kaj **S-ro A. Van der Biest**, el Antwerpen. La unua estis tre konata inter la balkanaj esperantistoj kaj estis ĉefredaktoro de « Danubo » ; la dua prezidis antaŭ kelkaj monatoj la Sepan Kongreson de Esperanto en Antverpeno. Ilian memoron, dum longa tempo, ni konservas kaj ni provos sekvi la ekzemplon donitan de ili rilate al la fideleco por nia lingvo ; kun malĝojo, kun respekto ni kliniĝas antaŭ iliaj tomboj.

En Sudaŭstralilando okazis sukcesplena kongreso esperantista : tiu ĉi estis la unua kaj multaj administrantoj de la regiono ĉeestis.

En Dundee (Skotlando) estis ĵus fondata framasona grupo esperantista ; en Utreĥt (Nederlando) katolika grupo. Jen argumento kontraŭ la personoj, kiuj pretendas, ke nia lingvo ne estas neŭtrala ilo.

En Samos, Esperanto estas nun instruata en 23 urboj.

En Glasgow (Skotlando), en Debreczen (Hungarlando), okazis paroladoj de U. E. A.

En Franclando, nova kurso en Limoges ; en Beauvais, kurso per korespondado funkciadas por ebligi al la esperantistoj uzi la lingvon dum milito : estas la semoj de la Ruĝa Kruco ebligataj por ĉiuj nacioj.

La Grupo de Marseille nin sciigas, ke nova oficejo esperantista ekzistas nun en tiu urbo. Librovendejo Blancard, 51, rue de Paradis. Parizanoj, vizitontoj de la « Lazura Marbordo », atente notu tiun adreson.

Nia ĉefurbo preparas la Kongreson de la S. F. P. E. Niaj bonaj amikoj de la Sekcio de la Latina Kvartalo de la Grupo de Paris aranĝas tiun festaron, kiu certe sukcesos. Pri tiu Kongreso estas parolate aliloke.

« Esperanto » enhavas artikolon de S-ro Rousseau pri la bilanco de nia kara U. E. A. « Dum la pasinta jaro la nombro plialtigis de 7000 ĝis 7804, ni havas 280 Esperantiajn entreprenojn... resume oni vidas, ke la tuta maŝino estas plene konstruita per kvarjara klopodado kaj spertado. »

La « Bulletin Officiel » de la S. F. P. E. donas la detalon de la francaj federacioj kaj anaroj sendependaj en nia lando. Jen tiu interesa listo :

Federacioj (10)	Nombro de grupoj membroj		Grupoj sendependaj (18)	Nombro de membroj
Aube	14	568	Angers	25
Bourgogne.	20	1489	Beauvais	37
Centre-Ouest.	16	992	Béziers	33
Nord	14	750	Chatou	32
Normandie.	12	598	Creil	28
Ouest	5	148	La Roche-sur-Yon	17
Provence.	9	357	Le Puy.	60
Région Parisienne	28	1536	Melun (<i>Espero Meluna</i>)	25
Rhodanienne.	22	779	Moulins.	16
Sud-Ouest	9	520	Nancy	96
			Paris (<i>Verda Stelo</i>).	75
			Paris (<i>XVII^e Arrond^o</i>)	65
			Perpignan	34
	149	7737	St-Dizier	20
			St-Léon-lès-Domart.	25
			Sedan	20
			Versailles.	30
			Vitry-sur-Seine	10
				648

Sume : 10 Federacioj, 167 Grupoj (18 sendependaj inter ili) : 8385 membroj.

« Lingvo Internacia » de Januaro 1912 enhavas tute interesan opinion de D-ro Zamenhof pri la reformoj kaj la reformistoj. Tiu opinio estis esprimita de D-ro Zamenhof en letero al S-ro Trompeter kaj jam publikigita en « Lingvo Internacia » en 1896. Estas do malnova paĝo, sed tamen tute notinda hodiaŭ, kiam oni konstatas la ĉiaman agadon de la malamikoj de Esperanto.

Jen kelkaj eltiraĵoj el tiu letero. D-ro Zamenhof diras pri la reformistoj :

« Kiam ili el la ofero de eterna projektado devis transiri al efektivigado, ili ne sciis kiel tion ĉi fari, kaj la parti-

anoj forkuris de ili, ĉar ĉiu kapo havis apartan opinion.....
Kiel forte jam starus eble nia afero, se diversaj reformistoj,
perfektigistoj, novasistemistoj kaj unuigistoj ne laboradus
por ĝia diskreditigado sub preteksto de amo al la afero. »

La « Dek-Sepa » ĉiam samopiniis kiel la aŭtoro de la
Fundamento en tiu letero.

Ni daŭrigu, kaj dank' al nia fideleco konstanta, la bar-
iloj « ekkrakos kaj falos por ĉiam ».

ROBERT BOLLACK.



AL NIAJ KONTRAŬULOJ

Speciale dediĉita de la aŭtoro al la « Dek-Sepa ».

Pro kio bruas vi, sensencaj skeptikuloj ?

Ĉu vi fariĝis efektive blindaj ?

Aŭ vi ne fidus jam al propraj ĉe okuloj ?

Ĉirkaŭrigardu, homoj kompatindaj :

Bukedon luksan el **diversaromaj** floroj

Preparas arte ĝardenisto sperta.

Belegan bildon per **diversaj** nur koloroj

Artisto pentras per la mano lerta.

El plej **diversaj**, tute malsimilaj tonoj

Kreiĝas ĉarma, sorĉa melodio,

Vin derlotanta per belegaj siaj sonoj,

Se per surdeco vin ne punis Dio. . . .

Do, kial krias vi, ke nia Esperanto,

El plej **diversaj** lingvoj kunmetita,

Sensenca estas kaj sentaŭga ia vanto,

Miksaĵo ia stranga kaj malsprita ?!

Se vi ne estus tro obstinaj, vi konfesus,

Ke viaj pensoj estas tro malsaĝaj,

Kaj, eble, tiam ankaŭ vi progresus . . .

Sed, bedaŭrinde, restas vi sovaĝaj ! . . .

Kaj ni, Zamenhofanoj, montros al la mondo,

Ke nun la **plej diversa diverseco**

Eĉ helpas, ke en nia familia rondo

Reĝadu amo, paco kaj frateco.

V. Devjatnin.

INTER NI

La unua parolado farita de nia amiko Caballero, pri Algerilando, bone sukcesis kaj estis longe akompanita per lumbildoj kaj fotografajoj. Kaj kiom signifoplenaj ili estis!



Tiu, kiu ne konas la ludon « je la paperetoj », tiu nepre devas veni ĉe nin por ĝin lerni!



La « fantazia humoraĵo » de Lhermitte, bedaŭrinde, okazis franclingve. Kiom mi kompatas la nefranclingvanojn!



La anoncita parolado « De Paris ĝis la lando de Meznokta Suno » (bela titolo, ĉu ne?) estis anstataŭigita per parolado pri... Greklando!! Cetere, pro la proksimeco de l' du landoj, la diferenco ne fariĝis tro grava! S-ro Ro Bo ne timas la grandajn distancojn!



Antaŭ nelonge, nin vizitis S-roj Radomir Klajić (Serbo), Cart, Ternon (el Le Havre), Cloupet (el Lyon), Zigler, Polgar, k. t. p., k. t. p.



Via parolado pri Nederlando ne okazis, Via Bibliotekista Moŝto! Pro kio do? Ĉu seriozaj estis la motivoj?

FUŜISTO.

KONTRAŬ
M A R -
MAL-
SANO

DELPHININE

De l' DOKTORO FLASSCHEN.

KONTRAŬ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WEITZ, 8, Rue de Duras, Paris
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

Unua festo de la Zamenhofa Artista Adeptaro.

Mi ĝojas anonci al la « Dek-Sepuloj », ke nia unua festo bonege sukcesis pro la bona programaranĝo de S-ro Devjatnin, reĝisoro, kiu estis helpata de talentaj artistoj : F-inoj Smeraldo (pseŭdonimo, certe!!) kaj Olivier, S-inoj Rémond kaj Schæfer, S-roj de Coppet, Couteaux, Bollack, Grosset, Dubois, kiuj, per la du teatraĵoj « Paco hejme » kaj « Urso », monologoj kaj kantoj, nin distris dum pli ol du horoj. Poste sekvis baletoj ĝis la unua matene.


Inter la pli ol 100 kunvenintoj, krom multaj « Dek-Sepanoj » ĉeestis S-roj Th. Cart, P. de Lengyel, Gesinjoroj de Ménil, Solsona, Frechas, C. Bourlet, Paul Blaise (el Londono), Aymonier, V. Polgar, Arnoux, k. t. p., k. t. p.

Senkulpigitaj : S-roj Rollet de l'Isle, Angély kaj Sebert.

La proksima festo okazos, tre kredeble, *lundon, 25-an de Marto*, ĉe sama loko kaj horo; cetere, de nun, biletoj estas aĉeteblaj.

Ĝis baldaŭa revido !

ĈEESTINTO.



LANDA FOIRO

Antaŭ kvardek jaroj mi estis unuajara lerneĵano. Mia instruisto, la maljuna « patro Georgo », — kiel ni infanoj lin nomis laŭ lia deziro, — estis eminenta pedagogo. Anstataŭ plenstopi la kapojn de la lernantoj per sekaj sciencoj, li klopodis, ke ili amu la lernejon. Li havis la kutimon, rakonti seriozajn kaj amuzajn fabletojn kaj fabelojn, post la lecionaj horoj. Unu el tiuj rakontoj estas la sekvanta aventuro, kiun mi nun laŭmemore rekopias el la neniam eldonita libro de liaj verkoj.

... Estas varmega somero. Sur la larĝa landvojo montriĝas nenia signo de vivo, — mi volas diri : *homa* vivo, ĉar kreskaĵoj kaj kampaj bestetoj ne ludas gravan rolon en tiu ĉi rakonto. Tiun senhoman landvojon limigas sufiĉe granda urbo. Kelkajn kilometrojn pli malproksime, modesta vilaĝo vidigas. La scenejo de nia dramo (ha, jes ! mi forĝesis diri,

ke nia rakonto estas dramo; sed se vi volas, vi povas ĝin konsideri komedio) . . . do, la scenejo estas tiu parto de la landvojo, kiu etendiĝas inter la urbo kaj la vilaĝo.

Vi certe memoras ankoraŭ, kara leganto, ke tiu landvojo estas larĝa, kaj ke nenia signo de vivo montriĝas sur ĝi. Sed dum vi tralegis la ĵusan geografian priskriĵon, la situacio de nia jam detale konata landvojo ŝanĝiĝis. Ne pri la larĝeco, sed pri la senhomeco. Rigardu nur laŭ la direkto de l'urbo: vi vidos, ke unu viro ĵus elvenis el ĝi kaj marŝas sur la landvojo, dandecce svingante en la dekstra mano multekostan promenbastonon arĝentokapan.

Estas necese, ke mi konigu al vi tiun viron. Li estas mezkreska, beleta viro, kun zorgo kombita barbo kaj bluaj okuloj. Lia apero faras tre bonan impreson, tiom pli, ĉar li estas elegante vestita. Brilgladita tubforma ĉapelo kaj luksa redingoto kovras lian gracitalian korpon, kaj liaj mirinde bele ciritaj ŝuoj kaj festena ĉemizo fariĝis tiel famaj, ke eĉ la ĵurnaloj preparolis ilin.

Sed, ho ve! oni diras (kaj multaj oni-oj!), ke tiu eleganta vestaĵo kaj bela korpo kovras malelegantan kaj malbelan animon. Oni diras... oni diras.... Kompreneble, la « oni-diras »-oj ne estas ĉiam senkondiĉe aŭtentikaj; oni povas ilin kredi aŭ ne kredi.

Nian elegantan heroon oni nomas Kopekov. La historio okazis verŝajne en Rusujo, alie oni ne estus lin nomanta Kopekov. Cetere, « Kopekov » ne estas lia efektiva nomo; oni nur alnomis lin tiel, — kredeble ĉar li tre ŝatas la monon, la kopekojn kaj rublojn. Mi ne memoras plu pri lia efektiva nomo.

Nun, kara leganto, turnu vian dorson al Kopekov, — ne kiel signon de malestimo, sed por ke vi povu vidi la alian heroon de tiu ĉi dramo, la simplulon, kiu ĵus eliris el la vi-

LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

— Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. —

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

laĝo, ĉe la alia parto de la jam detale konata landvojo. Li estas tiel simple vestita, ke eĉ ne estas peninde perdi la tempon per la observado de lia eksterajo. Li estas malriĉa kolportisto, kiu penadas iri en la urbon, al la hodiaŭa landa foiro, por disvendi siajn tre ordinarajn komercaĵojn, kiujn li *portas* en tolpakaĵo ligita al sia *kolo* (jen do kial li estas « kol - port - isto »!).

Kopekov kaj la kolportisto baldaŭ renkontiĝas sur la mezo de la landvojo, ĝuste apud la bordo de rivereto. La kolportisto dece salutas; Kopekov ruzridete karesas sian belan barbon, — signo de kontenteco.

— Kien vi iras? — demandis Kopekov arogantvoĉe.

— En la urbon, — respondis la kolportisto, delevante sian ĉapon.

— Kion vi intencas en la urbo?

— Partopreni en la landa foiro.

— En la landa foiro? Kaj kial?

— Por vendi miajn komercaĵojn.

— Kiajn komercaĵojn vi havas?

— Nu, komercaĵojn, diversajn komercaĵojn.

— Montru!

— Ĉu mi montru ilin? Tie ĉi mi ne povas; la loko ja ne estas konvena por ĝi.

— Tuj montru ilin! — kriegis Kopekov, svingante sian multekostan bastonon arĝentokapan. — Alie.....

Li ne finis la frazon; la kolportisto ja divenis ĝin. Ho! li konis Kopekov'on, kaj sciis, ke li fidele plenumadas siajn minacojn, kaj la svingado de la bastono tute klare komprenigis al li la sekvon. Li do komencis petegi.

Vane. Kopekov ne cedis. Refoje li levis la arĝentokapan « argumentilon », dirante:

— Tuj elpaku tie ĉi viajn vendotaĵojn, kvazaŭ vi tion farus ĉe landa foiro. Jes! ni faros grandegan *landan foiron!*

La tremanta kolportisto estis devigata elpaki siajn komercaĵojn kaj arange elmeti ilin sur la larĝan tolon, tiel, kiel li ĝin farus ĉe la landa foiro mem.

Kiam li estis preta, Kopekov alpaŝis al la komercaĵoj, kaj, apoginte sian bastonon al arbo, komencis dumane elektadi el ili, kvazaŭ avida foira aĉetanto.

— Kiaj fuŝaĵoj! — li diris, levetante ĉiun objekton.

Efektive, la komercaĵoj estis tre diversaj : lipharpomadoj, migdalaj tortoj, cirbrosoj, grasaj lardopecoj, argilaj pipoj, sekaj haringoj, poŝaj speguletoj, rancaj kolbasoj, alumetujoj, mielkukoj, kravatpingloj, terpombombonoj, poŝtukoj, biskvitoj, viprimenoj, bakitaj kukurboj, sebkandeloj, kanditaj kaŝtanoj, muskaptiloj, k. t. p., k. t. p.

— Kiaj fuŝaĵoj ! — remurmuris Kopekov, dum la tremanta kolportisto time kuntiriĝis post li.

Subite Kopekov ekvidis ruĝkovrilan libron, kuŝantan sur la angulo de l' tolo. Li prenis ĝin kaj laŭte legis ĝian titolon : « Vortaro Kompleta..... ».

Kopekov nerve pinĉetis siajn belajn lipharojn, — signo de malkontenteco.

— Ki... ki... kiel ! — li blekis kun la plej ekstrema kolero, — vi kuraĝas vendi ĉi tiun majstropecan libron ĉe landa foiraĉo?... Kanajlo ! ci ! mizerulo ! profanulo !... ci !... ci !...

— Ne, via sinjora mosto, — respondis la kolportisto tremante kiel gelateno, — mi ne vendas ĝin ; mi nur *enpakas* en ĝiajn foliojn la venditajn kolbasojn kaj lardojn.

Kopekov paliĝis, ruĝiĝis, verdiĝis, blankiĝis, flaviĝis kaj bluiĝis pro furiozo. Li estis konsternita tiagrade, ke li eĉ ne povis paroli. Li do agis senminace : li kaptis la tolon kune kun la komercaĵoj, por ĵeti ilin en la rivereton.

La kolportisto divenis lian intencon kaj tuj decidis savi sian riĉaĵon. Li prenis la multekostan arĝentokapan bastonon de Kopekov, ĝin alte svingis, kaj poste... *puff*... ĝin alfrapis kuraĝe al la kapo de ĝia eleganta posedanto.

La brilgladita tubforma ĉapelo falis teren, kaj Kopekov mem sekvis ĝin : li ankaŭ falis teren. Koto makulis la brustan parton de la festena ĉemizo.

— Kion vi faris ? — li balbutis, senpove kuŝante sur sia ventro. — Mi mortigos cin ! Kial ci kuraĝis min bati ?

— Ĉu *mi* batis vin ? — diris la kolportisto.

— Kiu do ? — stertoris Kopekov, baraktante en la koto.

— Nu, — respondis la kolportisto, — ĉu mi povas scii, kiu batis vin en tiu ĉi grandega landa foiro ?...

Paul de Lengyel.



AL MIA VERDA STELO

Intima simbolo: kiom da fojoj mi cin rigardis kareseme!... Kiom da fojoj mi cin vidis bruste almetita? ĉe malproksimaj simpatiplenaj samideanoj kaj... Kiom da fojoj mi cin fingreprenis amete kaj kun noblaj sopiroj kaj memoroj mi cin agrafis sur alian!...

Edzino amata; flava ci jam estas: profunde mi sopiras cian junecon helan kiam ci briletis kiam ci estis ankoraŭ virga, tio estas: kiam neniu homo fieris per ci, kiam ci estis nova kaj ankoraŭ tiutempe la rigardoj de la homoj, ciaj ne-amikoj, ne cin trafis.... Simila je unu iluzio kiu perdas multe el sia beleco ideala, ci jam elperdis ciajn unuajn brilojn!... Tamen mi ne cin amis en ciaj diinaj elaspektoj! Ne, milo da fojoj ne! Mi cin amas fortege tial, ke ci memorigas min pri miaj samideanoj, tiuj aliuloj, kiuj kun mi formas « grandan rondon familian ».

Mi scias, ke ci akiras belecon supernaturan kiam ci estas ornamanta la brustojn trememajn, sopiremajn, revemajn de samideaninoj... kaj ke ci cin elmontras sur vestoj de miloj kaj miloj de homoj, miaj fratoj!

Mi cin ne forlasos! Mi cin kunportos kun miaj gajeco kaj turmentoj!... Ci ankaŭ reciproke min akompanu en tiuj lastaj momentoj, kiam la vivo jam plu ne elestos! Pro tio mi suferas kompleze ciajn devigojn, tial mi religie cin bruste portas sen honto, sen timo. Certe velkita ci jam estas kvaŝaŭ tiuj velkemaj, facilmortemaj floroj kun kaliketo verdec, kiuj dum du tagoj naskiĝas al suno, ekzistas, amas kaj elmortas!... Jes, ci ripozos kun mi post la turmentoj de la vivo; ni eterne, ambaŭ kune ripozos, por ke en postea tempo kiam oni trovos mian korpan resteton, homoj diru: « *tiu homo estis esperantisto* ».

Restu do, amatino mia sur mia koro: tiele ci estas pli proksime al cia ejo propra!

Reste kun mi, adoratino mia, purā kiel la boskoj de mia lando, vastanima kiel la supertera amplekso kaj inda je mia varma amo!

Carlos Julio Martinez.

(*El Kolumbia Stelo.*)

BIBLIOGRAFIO

Esperantista Poŝkalendaro 1912, redaktita de D-ro Albert Schramm. 153 p. 10 × 16. — Berlin S. W. 68, Esperanto Verlag Möller u. Borel, Lindenstr. 18-19. Prezo: S 0,400.

Jen vere praktika kaj utila kalendaro, kiu rekomendigas per si mem, ĉar la eminenta mortinta Prof. D-ro Lederer okupigis pri ĝia elfarado. Tiu kalendaro duonkartone kovrita enhavas multajn utilajn sciigojn, estas lukse eldonita kaj multe pli valoras, ol la mono postulita. — Ni varme rekomendas ĝin al niaj belegantoj.

SE VI SUFERAS pri la **STOMAKO** aŭ la **INTESTOJ**, ne hezitu unu minuton provi la

MAYA BULGARE

Bulgara Lakta Kazeajo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris

TÉLÉPHONE 214-40.

Germana Esperantisto

Duonmonata gazeto por la disvastigado de Esperanto.

La gazeto aperas en *du eldonoj*, kiuj duonmonate alternas.

Eldono A, eliranta la *5-an de ĉiu monato*, celas la *propagandon por Esperanto*. Ĝi enhavas tiurilatajn artikolojn en germana kaj esperanta lingvoj kaj kronikojn pri la germana kaj internacia Esperanto-movado.

Eldono B, eliranta la *20-an de ĉiu monato*, estas *pure literatura*. Ĝia enhavo konsistas el pli-malpli facilaj legajoj kiel eble plej bonstilaj, ekzercoj kun apuda germana teksto, por komencantoj kaj progresintoj; bibliografio, konkursoj, praktikaj konsiloj, enigma parto, k. t. p.

Jara abonprezo por Germanujo kaj Aŭstrio-Hungarujo 4 M. (2 Sm.), por ĉiuj aliaj landoj 2,250 Sm.

La abonoj nur komenciĝas en Januaro, Aprilo, Julio kaj Oktobro.

Laŭdezire oni povas *aparte aboni ĉiun el ambaŭ tute sendependaj eldonoj* por la *duono* de la supre montritaj prezoj.

Esperanto Verlag Möller & Borel

BERLIN SW. 68, Lindenstr. 18-19.



Vera
 Ferhava Salo
 alsimiligobla

ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LA

Fer Robin

mirinde efikas

KONTRAŬ

SENSANGECO,
 PALKOLORECO,
 SANGELFLUOJ
 ĈIUSPECAJ

Akoelas la nutradon kaj
 neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute senĝusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ce ĉiu mango, ĉu en ioma akvo aŭ vino. La enhavo de la boteto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn

POSTULU la ROBIN

VENDEJO POGRANDE:

13, Rue de Poissy, PARIS